

SIMPOZIA ALVOKO

ILEI-Simpozio Edukado al respekt plena turismo Busano, Korea Respubliko, 20/21 julio 2017

En la jaro 2017, kiun UN deklaris *Internacia jaro de daŭropova turismo*, en kiu la Korea Turisma Organizo subtenas la organizon de la 102-a UK kaj la Busana Turisma Organizo la 50-an ILEI-Kongreson, ILEI enfokusigas la turismon sub la lumo de sia laŭstatuta celo: *Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo*.

Turismo signifas vojaĝadon aŭ ekskursadon por plezuro aŭ sporto. En la ŝtata ekonomio ĝi estas grava branĉo, unu el la fontoj de la malneta nacia produkto plenigantaj la ŝtatan buĝeton. En la Esperanto-komunumo okazas la Esperanto-turismo kiel unu formo de la ekonomio de Esperanto – fonto de financaj rimedoj de Esperanto-organizoj, sed ankaŭ kiel vojo kaj rimedo de disvastigado de Esperanto kaj ĝiaj servoj al homoj, institucioj kaj al la homaro. La Universala kaj fakaj kongresoj de Esperanto, Esperanto-staĝoj kaj kursaroj, festivaloj, novjaraj kaj aliaj renkontiĝoj de esperantistoj, la Pasporta Servo, estas iuj el ĝiaj formoj. La klopodo komunikiĝi rekte kun loĝantoj de la vizitata regiono estas ĝia grava trajto.

En la pedagogia kunteksto ĝi povas esti studtemo de ĝenerala kleriĝo kaj profesia kapabliĝo, sed ankaŭ instrurimedo kaj lernmedio. Ĝi renkontigas homojn kaj kulturojn, malfermas komunikproblemojn kaj proponas la solvojn. Edukado al respekto en turismo – respekto al la turistaj gastoj kaj gastigantoj, al naturaj kaj kulturaj valoroj de la turismaj lokoj, al la homo kaj al la naturo – estos en la fokuso de ILEI-simpozio pri la kongresa temo, kiu laŭtradicie okazos en la lastaj du kongresaj labortagoj.

Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman aliĝilon kiel por la tuta kongreso kaj pagi la nursimpozian kotizon laŭ la kotiztabelo kiu akompanas la elektronikan aŭ la printeban aliĝilojn atingebajn tra <http://www.ilei.info/agado/Busan2017.php>.

Jen kelkaj sugestoj por prelegtemoj, tamen sen limigo al nur tiuj ĉi:

1. Pedagogiaj valoroj de turismo
2. Turisma ekonomio de la Esperanto-komunumo
3. Kleriga turismo
4. Profesia edukado por turismo
5. Komunikaj problemoj kaj solvoj en turismo
6. Interkulturaj proksimiĝoj per Esperanta turismo
7. Aprezo de kulturaj specifajoj, naturo kaj vivmaniero de vizitataj lokoj
8. Kompreno de bezonoj kaj kulturaj specifajoj de vizitantoj
9. Faka terminaro kaj turisma literaturo en Esperanto

Se vi volas prelegi pri tiu ĉi temaro, ni tre kore invitas vin sendi al la organizantoj vian prelegproponon kun jenaj elementoj:

- prelegtitolo,
- nomo kaj institucio de la aŭtoro,
- resumo en 100-200 vortoj,
- 3 - 5 ŝlosilaj vortoj, kaj
- 150-vorta prezento de la aŭtoro
- preskvalita foto de la aŭtoro.

Vian prelegproponon kun tiuj elementoj bonvolu sendi ĝis la 15a de majo 2017 al: radojica.petrovic.rs@gmail.com, aŭ al la poŝtadreso de la estrarano pri kongresoj trovebla sur la interna kovrilpaĝo de IPR. Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke. Viaj resumoj estos publikigitaj en la *Kongresa Libro*. Por la prelego vi disponos pri 20 minutoj kun 10 minutoj por diskuto. Se vi liveros plenan tekston de la prelego ĝis la 30-a de septembro 2017, ĝi estos publikigita en *Internacia Pedagogia Revuo*, aŭ alimaniere.

La lingvo de la simpozio estas Esperanto kun eblaj kontribuoj de neesperantistoj en la korea aŭ angla. Se la prelego ne okazos en Esperanto, la ĉeestantoj ricevos resumon aŭ alimaniere interpreton en Esperanto. Por neesperantistaj partoprenantoj estos certigita prezento de Esperantaj prelegoj en la korea aŭ angla lingvoj.

Limdatoj

- 2017-05-15: Sendo de prelegproponoj
- 2017-05-31: Informo pri akcepto
- 2017-06-15: Aliĝo kaj kotizpago (por ne jam aliĝintoj)

- 2017-06-30: Prelegantoj kaj organizantoj kunlabore aranĝos 2- aŭ 3-lingvan prezenton de la prelegoj (dulingva ekranprezentado / postsekva interpretado / presita koncizigo de la prelego en alia lingvo)
- 2017-06-30: Definitivigo de la simpozia programo por *Kongresa libro*
- 2017-09-30: Sendo de prespretaj prelegoj por papera aŭ reta publikigo

Ni esperas vian entuziasman reagon al ĉi tiu alvoko kaj vian partoprenon en la simpozio. Bonvolu diskonigi la alvokon al aliaj eblaj interesatoj, esperantistaj aŭ neesperantistaj. La simpozio estas grava evento dum la ILEI-kongreso, kiun ni komune povos sukcese realigi.

Bonvenon!

Estrarano pri kongresoj, Radojica PETROVIĆ